

KIEL DIRI TRIMANIERE

(9-A VIDEOLECIONO)

Celata publiko:

Lernintoj de baza kurso de Esperanto.

Antaŭtaksita kvanto de la videoj: 14

Periodeco de la publikigoj: ĉiusabate.

Neatendite

Georgo kaj Rita decidis

vojaĝi al


Koreio,

por spekti la

Olimpikojn

de la Vintro

de 2018.



**Sen antaŭa
pripenso**

**Georgo kaj
Rita havis la
decidon**

flugiri al

Koreio, por

ĉeesti la

Vintrajn

Olimpikojn de

2018.

**Subite Georgo kaj Rita interkonsentis
veturi al Koreujo, por vidi la Vintrajn
Olimpiajn Ludojn de 2018.**

Ĵus alveninte en Pjonĉangon (diskrikton en la sud-korea provinco Gangvono), kie okazis la malfermo (en la 9-a de februaro), kaj okazos la fermo (en la 25-a de februaro) de la vintroludoj), ili tuj serĉis malmultekostan gastigejon, pli aŭ malpli proksiman de la vintra sportejo.



Apenaŭ ili alvenis al la distrikto-sidejo de la Olimpiaj Ludoj, ili tuj kuris, por trovi malaltprezan hotelon, pli-malpli proksiman al la sportludejo.

Tuj post kiam ili alvenis en la distrikton-sidejon de la Olimpikoj, ili rapidis serĉe de malaltkosta gastdomo ne malproksima de la ludeventejo.

Ŝanĝinte la ideon, ili preferis akcepti la inviton de Jung-Hee, iu Pasport-ana esperantisto, kaj gastigis en loĝdomo, en la mezo de Pjonĉango, proksime de la sportejo.

Ekpensinte malsame ili akceptis inviton de Jung-Hee, iu loka e-isto, membro de la Pasporta Servo, kaj decidis engastiĝi en domo en la centro de Pjonĉango, malmultajn metrojn for de la vintra ludejo.



Repensinte pri tio, ili decidiĝis por gastigo en la loĝejo de Jung-Hee, Pasport-Serva esperantisto, kiu sin proponis gastigi ilin centre de Pjonĉango, mallongan distancon for de la stadiono.

En la malferma ceremonio Rita emociiĝis, kiam ŝi vidis atletojn de Sud-Koreio kunigitajn kun atletoj de Nord-Koreio.



En la malferma solenaĵo de tiu grava vintraĵo Rita spertis fortan kunsenton, kiam ŝi rigardis ludistojn de ambaŭ Koreioj kunigitajn.

En la solena malfermo de tiu impona okazaĵo Rita kortuŝiĝis, vidante la sud-koreajn apud la nord-koreaj sportistoj.

Post kiam ili spektis la glacihokeon, la artan sketadon kaj la liberstilan skiadon, ili veturis turisme, kune kun sia esperantista amiko, al la monto Kungango, en la limo kun Nord-Koreio.



Spektinte la glacihokeon, la artan sketadon kaj la liberstilan skiadon, la paro vojaĝis ekskurse, kun la amiko-esperantisto, sur la monton Kungangsanon, limen kun Nord-Koreio.

Vidinte la glacihokeon, la artan sketadon kaj la liberstilan skiadon, la geamatoj iris promeni, kune kun la amiko esperantisto, sur Kungangsano, monto lima kun Nord-Koreujo.

São Paulo
21°C



GLACIHOKEO

São Paulo
21°C

UNU SOLA KOREUJO



Arta Sketado



Liberstila Skiado

Tie en Kungangsano, Jung-Hee renkontiĝis kun sia frato Bon-Hwa, kiu vivas en la norda parto de la duoninsulo.

Sur tiu monto geparencoj de ambaŭ partoj de la korea duoninsulo povas revidi unuj aliajn de tempo al tempo.



Sur la monto Kungango Jung-Hee havis la oportunon revidi sian fraton Bon-Hwa, kiu loĝas en Nord-Koreio. En tiu loko parencoj disigitaj pro la divido de Koreio havas la permeson renkontiĝi unuj kun la aliaj okaze.

Sur Kungangsano, Jung-Hee rerenkontiĝis kun la frato Bon-Hwa, kiu vivas en la norda parto de Koreujo.

Tie parencoj de la du flankoj de la korea duoninsulo rajtas interrenkonti periode.



euronews

Atualizar Windows
Acesse Configurações para atualizar Windows


euro
news






**Kim Yo-jong,
la reprezentanto
de Nord-Koreio**

**Moon Jae-in,
la prezidento
de Sud-Koreio**





Tre frue en la
posta mateno
Georgo kaj Rita
faris rapidan
ekskurson tra la
montaro
Taebaeko.



Dum la
sunleviĝo de la
sekvinta
mateno la
geamatoj
ekskursis supre
sur la monto
Taebaeko.

Tuj frue en la sekvanta mateno la paro faris
nelongedaŭran promenon sur la montaro
Taebaeksano.

MONTARO TAEBAEKO,

kie situas la olimpika urbo Pjonĉango



Ativar o Windows
Acesse Configurações para ativar o Windows.

103a UNIVERSALA

LISBONO 2018
28 JULIO - 4 AŬGUSTO



KONGRESO

de ESPERANTO ■



Gonçalo Elias

Organizis: Josenilton kaj Madragoa

